I'm not sure. Attendance at KK wasn't always good, and federation activity was failing in many places. Furthermore, allocation was scarcely fair – big federations with many people and cities were allotted large *kapkotizoj*, whilst smaller and remoter federations, where fares to KK would have been much greater, received less. KK expenses could just as easily have been paid from BEA funds, without this messy accounting procedure, and the cost of lessons and posters met as proper educational or publicity expenditure. EAB printed and dispatched newsletters for some federations with *La Brita Esperantisto*, to save postage, but it was an increasing burden on the office manager and the diminished number of volunteers at the London office.

The result of the *kapkotizo* system was an increasingly large debt showing on BEA's balance sheet, as the money was put aside and not used. *Konsila Komisiono* was asked to discuss with federations whether they would forego some of their credit to help the general financial situation. A number of those with large balances agreed. The total debt was thus reduced.

Then, at the time of the move from London, all the bookkeeping procedures were scrutinized in a tough internal audit. Personal accounts and *kapkotizoj* were scrapped as being inefficient and too time-consuming, and the remaining federation credits were amalgamated into one Federation Support Account of about £3,000. EAB then offered *kapkotizo* payment to any federation which supplied an annual report and asked for it. That didn't work either.

A sum of £500 now appears each year in the treasurer's budget, to support any federations or clubs trying to get established. This usually takes the form of indirect subsidy. EAB will print and send invitations for new groups and federations to all EAB members and associates in the catchment area – chosen by postcode, or other criteria. This probably hasn't been made sufficiently public, though I have offered such support at AGMs, and a few have taken it up. Ideally, we would have one person responsible for stimulating federations and groups with ideas and recommending subsidies where appropriate. Several federations have sent the remainder of their cash funds, in some cases substantial sums, to EAB for safe keeping.

Joyce Bunting, Honorary Treasurer

'Ni teatrumu!' – kia komedio!

Denove aŭdiĝis dum januaro ridado en la granda salono de la domo Estoril ĉe Wedgwood Memorial College: la ĉiujara evento Ni Festivalu! donis okazon al teatro-ŝatantoj jam (eble!) la dekkvinan fojon ĝui Ni Teatrumu!.

Sub la lerta gvidado de la 'impresario' de tiuj ĉi eventoj, Paul Gubbins, ni voĉlegis kaj rolludis, eĉ aktore trejniĝis laŭ sperta instruo de aktoro Collin Simmonds ... ĉio kun granda ĝuo.

Speguloj antaŭ ni esperantistoj

Paul ŝajne ne povas eviti la fakton, ke ĉiu jaro estas nun 'jubilea' – kaj ni pritraktis 'jubileajn' verkojn, precipe komediajn. Du unuaktaĵoj, *Provludo en la klubejo* kaj *La sonĝo de la kursgvidanto*, fontis el la gravega kolekto *Virino ĉe la landlimo* (eldonita en 1959) de d-ino Marjorie Boulton. Ambaŭ verkoj tenas spegulon antaŭ ni esperantistoj, por ne tro severe, tamen iom kritiki niajn agojn – aŭ ties mankon, kiam temas ekzemple pri pago de kotizo aŭ pri lernado de la akuzativo. Multo el tio daŭre aktualas – kaj simile statas pri la eĉ centjara verko *Ĉu Pumpilurbo havu pumpilon?* Inter ĝiaj temoj troviĝas 'virinaj rajtoj' kaj 'respondeco / korupteco de magistrato' – ĉu iom 'mod-ernaj' temoj ... aŭ simple 'et-ernaj'? Mirinde, ke en Leeds loĝanta franco, Fernand Maréchal, verkis per nur 21-jaraĝa lingvo ankoraŭ 'funkcikapablan' satiron. Flanka interesaĵo: el la akompanaj biografiaj notetoj, provizitaj de Paul, mi eksciis, ke tiu aŭtoro – profesia lingvo-instruisto – iĝis la unua sekretario de la tiam nova 'Esperantista Federacio de Yorkshire', do mi duoble danku al li!

Alta takso

Enkalkuleblas inter la dramaj spektakloj de la semajnfina programo la sabatvespera prelego de Geoffrey Greatrex. Bonŝance por ni la konata profesoro de kanada universitato pasigas iom da tempo en Anglio. Li partoprenis kelkajn sesiojn de Ni Teatrumu!, prilumante diversajn ecojn de la pritraktataj verkoj; konsilis pri edukaj aferoj en aliaj sesioj; sed ĉefe prezentis al la tuta ĉeestantaro de Ni Festivalu! (do ankaŭ al 'Drond-anoj') iom mallongigitan version de prelego jam prezentita dum la Roterdama Universala Kongreso en la Internacia Kongresa Universitato, pri la historiisto Prokopio de Cezareo. Geoffrey saĝe elektis taŭgajn informojn kaj bildojn por ĝustamaniere

klerigi kaj distri nian mikspotan publikon, kaj, per lia vigla entuziasma prezento, 'historio' – fakta – iĝis streĉa rakonto pri militoj, krimoj, intrigoj, kian fikcie verkus eble Johansson aŭ Nemere. La granda aplaŭdo montris la altan takson de la aŭskultintaro.

Vere ĝuaj kunvenoj

La dramaj kunvenoj estas vere ĝuaj: se lokaj kluboj daŭre ekzistas ie, la voĉlegado de teatraĵetoj, kian oni praktikas ĉe Ni Teatrumu! estas plurcele rekomendinda – kaj, kiu scias, iam eble prezentiĝos io antaŭ publiko ... kaj eĉ se ne, la ekzercado multe amuzas!

Malcolm Jones



Foto: Paulo Gubbins

Colin Simmonds en aktora pozo (kiun esperantiston strangolanta?)

A future for Esperanto in European defence?

Dear Editor,

I don't know how well acquainted Charles De Carteret is with the Esperanto language or the Esperanto movement. If he is an Esperanto-speaker it seems strange that he can write: "It (Esperanto) is mostly found among the ranks of the intelligentsia and those fascinated by linguistics". While there are, no doubt, Esperantists who regard themselves an intelligentsia (e.g. those associated with *Literatura Foiro* and the so-called Esperanto-Civito), and while there are some very erudite Esperanto-speakers, these are few, and most Esperantists are very ordinary people. Brazil is a notable example of a country where Esperanto-speakers are found in every class of society from intellectuals, like Geraldo Mattos and Sylla Chaves, to the descendants of African slaves. Further, it is surprising that when Charles De Carteret says: "It will be of great importance that an Esperanto Academy be established". He apparently does not know that there is already an Esperanto Academy – in fact, two if you include the recently formed Akademio Literatura de Esperanto.

But perhaps all this is beside the point. Would we welcome the use of Esperanto as a military language? Certainly Esperanto can effectively be used for any

purpose for which a national language is used, but surely L.L. Zamenhof would turn in his grave if his language of peace and international friendship were further to become a tool of the military (as it, in fact, has been by the US Army, as the editor's note mentions).

Some time ago, a Polish friend of mine, who is both an Esperantist and a publisher, told me that he was considering the compilation of a Polish-English military vocabulary, presumably for the use of Polish participants in NATO or a European Defence Service. He appeared to be suggesting that perhaps I could help in compiling the book. As it happened, I didn't and I wouldn't, even if I had had the military expertise to do so.

On the other hand (and there is always another hand), some might say that we should welcome the acceptance of Esperanto in every sphere of human activity.

We already have science fiction, poetry, technical writings, university theses, pop songs, religious texts, soft porn and bad language in Esperanto. It could be argued that unless our international language can be used for everything it is not a real language. But, of course, it is ...

Girvan McKay



Dear Editor,

The interesting article by Charles de Carteret made some very good points and should be appreciated by Esperantists as a very helpful way of breaking the deadlock over the widespread adoption of the language. When I wrote my pamphlet *One Language for One World* over a decade ago, I was not seeking to provide a means to facilitate military co-operation. Instead, I

hoped that the EU members would see the immense value that a common neutral language could import into the Union.

When the author suggests that an 'army' etc. would be inevitable, he forgets that essentially an army in our world has a military aim – to defeat, disable or annihilate a rival army – and that is almost invariably a national aim. So although the EU will have need of a European-wide force, it will have to be not an army, but a body with non-military aims.

The EU is the pattern for a united world, with the structure of law and unity protecting both minorities and the whole Union. 'Defence' is usually a euphemism used instead of 'military force' in order to evade the issues of right and wrong. NATO, formerly a strictly limited body concerned only with defence against an attack upon western Europe, is now engaged in a very dodgy military adventure in Afghanistan. Esperanto might provide an efficient common language, but the purpose of those forces using it could be highly questionable.

Some of these doubts could be moderated if the term 'defence' was not used; and the joint European forces were committed to purposes required for emergencies such as natural disaster or specific requests from the United Nations. Then the valuable advantages outlined by Charles de Carteret would not be rendered suspect by the dubious connotations of the fork-tongued word 'defence'.

I doubt if the fears of Esperanto losing its way and becoming perverted by adoption for a European service are valid. My guess is that the spirit, traditions and above all literature hammered out in over a century of the language would ensure its survival. And that would lead to its very welcome wider use.

John Roberts

Korespondi deziras

Bulgara sinjorino 65-jara, universitata instruisto en Sofio, deziras korespondi kun sinjoro 65- ĝis 80-jara por amikeco. Ŝi interesiĝas pri la naturo, arto, turismo kaj Ŝekspiraj sonetoj. S-ino Ani Mihajlova, bul. A. Stamboliski 67, Sofia, Bulgario. Ret-adreso: lin.art@abv.bg.



Subteni brazilan leĝomodifon

Estimataj,

Se vi aprobas la iniciaton de senatano Cristovam Buarque, kiu prezentis proponon modifantan la Leĝon n-ro 9394, de la 20-a de decembro 1996, permesante la libervolan instruadon de Esperanto en mezgradaj lernejoj de Brazilo, sendu gratulmesaĝon al li.

Lia retadreso estas:
<crisovam@senador.gov.br>.

Amike salutas,
Emilio Cid kaj Aloísio
Sartorato, Brazilo

Ps. Bonvolu diskonigi ĉi tiun retmesaĝon al vialandaj samideanoj!



Bildkartoj por kursanoj

Estimataj,

Baldaŭ komenciĝos mia somera baza Esperanto-kurso, kiu anstataŭas tiun ĉiujaran, semestran kurson por studentoj en preskaŭ ĉiuj karieroj je la nivelo bakalaŭro. Samkiel la alia, ĝi valoras 3 kreditpontojn kaj ne estas deviga, sed elektebla. Dek ses gestudentoj enskribiĝis.

Bonvolu sendi bildkartojn kun salutoj al jena adreso: Esperanto-kurso/Hugo Mora, Escuela de Filología, Universidad de Costa Rica, C.P. 11501-2060 San José, Kostariko.

Kursfine oni aranĝos bildkartan ekspozicion. Foton oni sendos al tiuj, kiuj skribos sian retadreson.

Amike salutas,
Hugo Mora, Kostariko

out of Babel? Raised with Esperanto as a mother tongue, Heather Eason discusses its future in a globalised world. The two-page article was illustrated with a picture of the Butler Library at EAB HQ.

• Kunlabori en la revizio de la vortaro Teach Yourself

John Wells nun revizias sian vortaron Teach Yourself. En ligo kun tio li verkas blogon, kiun vi trovos ĉe <http://vortaro-blogo.blogspot.com>. Li bonvenigas komentojn kaj opiniojn.

• QI with low IQ

The entertaining and usually erudite BBC1 programme *QI* let itself down on 20 February by claiming that Esperanto had 'only 900 words' – apparently why it was easy to learn! Other information presented by host Stephen Fry was correct, and he courageously said three phrases in Esperanto, with almost faultless pronunciation, asking the contestants to guess what they meant. They included 'Saluton!', and the amusing 'Mia kusenveturilo estas plena de angiloj!' (*kusen-* was, however, mispronounced 'kuzen').

MALLONGE

IN SHORT

• Subteno al la propono de MEP Ljudmila Novak

Oni demandas: "Ĉu vi aprobas la iniciaton de Eŭropa Parlamentano Novak por ke Esperanto fariĝu la komuna lingvo de komunikado en Eŭropa Unio?"

Je la 8-a de februaro, el sumo de 2 851 voĉoj, 2 822 jesis, 18 neis, 3 ne sciis, 8 aliaj. Vidu ĉe www.ljudmilanovak.org/modules (<http://minilien.fr/a0jnyb>).

• Esperanto featured in *The Times Literary Supplement*

On 6 February, issue No 5523 of the prestigious *Times Literary Supplement* published a nearly full-page, illustrated review by John Wells of Geoffrey Sutton's reference work *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto 1887–2007*. Much of the review is a general presentation of Esperanto and its situation. The cover of the Supplement featured the word 'Esperanto' in its list of contents.

• A way out of Babel?

The February/March issue of *The Linguist* (Vol.1, No.1, 2009; www.iol.org.uk) published an excellent feature entitled *A way*



'Bonvenon en Sieber en la Nacia Parko Harz' nun legeblas en Esperanto dank' al la agado de lokaj esperantistoj en Germanio.

- **Of Esperanto and 'sci-fi'**

Forrest J. Ackerman, the American magazine editor, who discovered science fiction author Ray Bradbury and is credited with coining the term 'sci-fi', died on 4 December 2008 in Los Angeles. He was 92.

By his late teens, he had mastered Esperanto. He is said to have provided the voice-overs for the film *Incubus* (www.scifi.com/scifiwire/print.php?id=62651).

A number of newspapers reported that in 1939 Ackerman attended the first World Science Fiction Convention in Manhattan dressed in a space suit. He wore the spaceman outfit around the city, attracting cries of "Buck Rogers!" and "Flash Gordon!" from local children. He said: "They had an Esperanto convention, the artificial language, which I know. ... So I was in this futuristic costume and I went up and explained in Esperanto that I was a time traveller from the future."

Some newspapers and blog sites pointed out Ackerman was a speaker and an advocate of Esperanto, and where they did not, Hilary Chapman has succeeded in having a note published on about fifty sites, including that of *The Coventry Telegraph*.

- **Traduki aŭtomate**

La retejo <<http://angryindian.blogspot.com>> proponas aŭtomatan tradukadon ankaŭ en Esperanton. Kiel atendeble, ne ĉiu vorto ĝustas en la rezulto, sed eventuale gravas la intenco.

- **Diskutforumo eŭropa**

Jean-François Clet petas anglalingvajn esperantistojn partopreni en la prieŭropa perreta diskutforumo ĉe <<http://forums.ec.europa.eu/debateeurope/viewforum.php?f=9&language=english>>.

- **Misteroj de la difina artikolo**

N-roj 139 kaj 140 de *La Gazeto* publikigis detalegan sciencan traktadon de Sergio Pokrovskij pri la uzo de la difina artikolo 'la' en Esperanto. En la Konkludo, li klarigas: "En aliaj lingvoj la artikolo povas havi aliajn utilajn funkciojn – sed ĉiujn tiajn aliajn funkciojn, kiujn mi ĝis nun trovis, en Esperanto multe pli bone plenumas aliaj, pli bonaj rimedoj. La situacio kiam okcidentano diras al ruso, ke la artikolo estas treege utila por precizigi la sencon, similas al situacio en kiu kriplulo laŭdas sian lambastonon al sana junulo: liaj laŭdoj estas tre pravaj, por li la lambastono estas treege, eksterdube kaj memevidente

utila; sed por la sana junulo ĝi estas ĝena."

- **Eksprokuroro de Usono interesiĝis pri Esperanto**

La 24-an de februaro, dum diskuthoro pri 'Sindeterminado, Internacia Juro kaj Politiko', Ramsey Clark, la Prokuroro de Usono inter 1967 kaj '69, sciigis pri sia intereso pri Esperanto. Iam en sia juneco li studis ĝin en Teksaso.

Nome de UEA, Neil Blonstein dum kelkaj minutoj starigis al li demandojn, interalie ĉu li subtenas la Eŭropan Union, kaj ĉu li scias, ke du membroj de la Eŭropa Parlamento rekomendas la studon de Esperanto.

Li parolis pozitive pri la Unio. Poste li komencis defendi indiĝenajn lingvojn. Private, Neil Blonstein klarigis al li kaj la Bolivia UN-Ambasadoro, ke ili povas dependi de la esperantistoj por defendi indiĝenajn lingvojn. La prelego okazis sub la aŭspicio de la Bolivia Misio ĉe UNO.

- **Mention in *The Vegetarian***

A piece on Wedgwood Memorial College in *The Vegetarian* (Spring issue, 2009) naturally mentioned that it 'also hosts the headquarters of the Esperanto Association of Britain'.

- **Lerniga babilado per video**

Komenciĝis nova kurso de Esperanto en atlernejo de la urbo Foshan, Ĉinio), kie Augusto Casquero instruas la hispanan kaj Esperanton. Partoprenas en la kurso ĉirkaŭ 50 gelernantoj, kaj inter ili kelkaj instruistoj. Por ili estus kuraĝige vidi kaj aŭskulti homojn, kiuj parolas nian lingvon. Similan sperton li havis antaŭ unu jaro, interkontaktiginte lernejon de Pollando kun lernejo de Ĉinio, tre sukcese. Li ŝatus en ĉiu klaso dediĉi kelkajn minutojn al videa rekontakto (eble pere de Skype) kun junaj geesperantistoj el diversaj landoj. Liaj gelernantoj estas pli ol 90-

Sveda renkontiĝo en bela naturo

22–24 majo 2009

Venu al popolaltlernejo Fornby, apud Borlänge, en Dalekarlio

- Ĉi-jare okazos: rapidkurso por akompanantoj aŭ eĉ partoprenantoj; tuttaga ekskurso al la mondfama kuprominejo en Falun, kiu estas sveda mondheredaĵo; ekskurso al la subĉiela muzika kaj opera scenejo Dalhalla, iama kalkŝtona minejo; promenoj en la bela ĉirkaŭaĵo; infanvartejo kun sperta gvidantino, kiu ludos kun ili kaj instruas al ili kantojn; samideanoj distros nin per sia muziko. Paul Gubbins prezentos propran teatraĵon. Krome li prelegos pri la projekto Lingvolanĉilo.

- Eksterlandaj partoprenantoj havos rabatitan kotizon. Pliaj informoj kaj aliĝoj ĉe Sveda Esperanto-Federacio, Vikingagatan 24, SE-113 42 Stockholm, Svedio. Retpaĝaro: www.esperanto.se/esperantistoj/sef/ aŭ sefkongr09@esperanto.se.

procente virinaj, inter 16- kaj 21-jaraĝaj. Se vi povos helpi, kontaktu Auguston Casquero: augustocasquero@gmail.com.

• **Rusa–Esperanta vortaro reta**

La plej populara vortara sistemo en la ruslingva interreto, Multitran.ru, nun havas ankaŭ dudirektan Esperantan vortaron.

Multitran.ru havas 200 korporaciajn klientojn, interalie la brita ambasado. Tage ĝin vizitas 90 000 uzantoj. Tiun popularecon la sistemo gajnis ne nur pro tio, ke ĝi estas senpaga kaj alproprigis pli ol 5 milionojn da terminoj, disdividitaj per 800 temaj rubrikoj, sed ankaŭ pro tio, ke ĉiu registrita uzanto rajtas aldoni, korekti novan terminon en ĉiu vortaro. Oni povas serĉi alfabeto, morfologie kaj fraze.

En aparta forumo por ĉiu lingvo eblas demandi pri dubinda traduko kaj proponi sian varianton.

• **Bonvenon en Ĉampanjo!**

La Nacia Interasocia Kongreso de Esperanto en Francio ĉi-jare okazos en la urbo Troyes, de la 7-a ĝis la 11-a de majo. Troyes estas la historia ĉefurbo de Ĉampanjo. La kongreso okazos en vasta kaj agrabla loko: Centre Sportif de l'Aube, 5 rue Marie Curie, alirebla por handikapuloj, oni trovos ĉion necesan por studema laboro: interretan konekton kaj memservan restoracion. La provizora programo, la praktikaj informoj kaj la aliĝilo estas legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe la retpaĝoj de: *Espéranto 10*: <http://esperanto10.free.fr>. Aliĝo estas senpaga por eksterlandanoj. (Informis Claude Nourmont.)



• **'Biggest' Southport meeting:** On 17 January at the Friends Meeting House, Southport, local Esperantists and others from Manchester joined members of the Baha'i Faith. One of them, Sylvia Miley, gave an excellent presentation with her colleagues about the shared history and links between Esperanto and their faith. This meeting was the biggest ever held by the Southport group, and they were pleased to discover that one of the Baha'i visitors was an Esperanto-speaker (Nicholas Bridgewater, a student from Manchester University) – he gave part of the presentation in Esperanto.

• **Z-Net requests translation**

On the website www.zmag.org/zlanguages, there appears the following: "To be truly effective, social change will have to happen internationally. It is therefore very exciting that there has been a spontaneous effort to translate material from Z-Net into many different languages.

"If you are interested in undertaking a new translation project into a new language from scratch, we can either post links to your server, or, if you do not have a server, you can then send us html pages that we can host for you..."

• **Malplimultoj eŭropaj**

Troviĝas plurlingva retpaĝaro pri eŭropaj popoloj ĉe www.eurominority.eu/version/epo/, en kiu ekzistas ankaŭ Esperantlingva versio. Kvankam estas kelketaj malgravaj eraroj, temas pri bonveniginda iniciato.

• **Kurso pri literaturo en Hago**

La 9-an de majo 2009 okazos en

la Domo Andreo Cseh, Hago, kurso pri Esperanta literaturo. Ed Borsboom prelegos pri dek klasikaj verkoj. La aliĝklotizo estas 28 eŭroj, kiu inkluzivas lunĉon. Pliaj informoj haveblas de s-ro Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando; tel. 00 31 70 3556677; rete: iesperanto@versatel.nl; retpaĝaro: www.iei.nl.

• **Tri grandaj informtabuloj**

En decembro okazis inaŭguro de tri novaj, grandformataj Esperantlingvaj informtabuloj ĉe la kajoj de la stacidomo en Herzberg, Germanio. Partoprenis i.a. la fervoja ĉefo Detlev Krusche kaj Urbestro Gerhard Walter, kiuj emfazis la unikan varb-efikon kaj por la stacidomo kaj por la urbo, kiel ankaŭ por la lingvo Esperanto.

• **Wedgwood Memorial College**

WMC now has a new website at www.stoke.gov.uk/wedgwoodmemorialcollege.

EAB bookshop – selection

Please add 15% for post and packing. Cheques payable to 'EAB'. You may make telephone purchases using your debit/credit card: tel. 0845 230 1887.

EAB cannot stock all titles, but can order items, for which you pay EAB in sterling. The UEA Catalogue is at: <http://katalogo.uea.org>.

Second-hand books are available from our librarian Geoffrey King: www.biblbut.org/html/brokante.



Ĉirkaŭ la mondo dum 80 tagoj *NEW* Jules Verne £16.00
Kaliningrad: Sezonoj, 2008. 224p., 20cm. A classic adventure story; Phileas Fogg attempts to circumnavigate the world in 80 days to win a bet. Translated from the French by Jean-Luc Tortel.

La dormanto vekigās *NEW* H.G. Wells £13.10
Rotterdam: Bero, 2008. 214p., 21cm. A man wakes after a 200-year sleep to find that his bank account has grown but society has changed. Translated by A.F. Milward.

Internaciaj ekzamenoj *NEW* £4.20
Rotterdam: UEA/ILEI, 2008. 38p., 21cm. A guide to the elementary and middle level ILEI/UEA international exams, with goals, syllabus, rules and specimen tests.

La kisa malsano S.J. Bakó & C. Piron £9.20
Vienna: IEM, 2000. 119p., 23cm. The second in the series "Tiaj ni estas". In the title story by Claude Piron everyone in a town has an urge to kiss – apart from the Esperantists. Also contains nine short stories by Bakó.

Komputeko *NEW* Yves Nevelsteen £5.60
Partizánske: Espero, 2008, 94p., 21cm. A printed version of the *komputeko.net* website, giving over 7600 computer-related terms in US-English with their Esperanto equivalents, listed in English word-order.

La kosmo kaj ni Galadí-Enríquez & Amri Wandel £12.25
Antwerp: FEL, 2005 (2nd ed.). 222p., 21cm, illustrated. A complete handbook on theoretical and practical astronomy, including discussions on galaxies, planets and life in the universe.

La skota lingvo, hodiaŭ kaj hieraŭ *NEW* William Auld £2.50
Glasgow: EAS, 2007. 16p., 21cm. A concise overview (in Esperanto) of the modern Scots language. With a foreword and additional notes by Girvan McKay.

Trans la spegulo kaj kion Alico trovis tie Lewis Carroll. Translated by Donald Broadribb. £6.20
Jekaterinburg: Sezonoj, 2001. 128p., 20cm, illus.. The children's classic tale of *Through the Looking Glass*.



Verdaj voĉoj (CD-ROM) Paul Gubbins £7.00
Barlaston: EAB, 2004. An interactive listening CD-ROM. 8 video clips of the famous and not-so-famous speaking Esperanto; accompanying exercises to aid comprehension. Excellent for 'tuning-the-ear' and for getting to grips with spoken Esperanto.

Verdaj voĉoj 2 (CD-ROM) Paul Gubbins £7.00
Barlaston: EAB, 2007. 10 exercises to aid comprehension, with 12 video clips and one audio clip.

Vere aŭ fantazie Claude Piron £13.10
Chapécó: Fonto, 2001 (3rd ed.). 239p., 21cm. Collection of stories from around the world, arranged so that a reader gradually improves their vocabulary.

Vikipedio por vi *NEW* Ziko van Dijk £4.20
Espero, 2008. 57p., 21cm, illus.. Vikipedio is the Esperanto-language version of Wikipedia, the internet's largest online encyclopaedia. This handbook explains how it works and how you can contribute to it.

107 krucenigmoj en Esperanto *NEW* Stano Marček £9.50
Slovakia: Martin, 2008. 88p., 27cm, illus.. 107 crosswords of varying difficulty.





• *Dutch postage stamps celebrating the 93rd World Esperanto Congress in Rotterdam last year and 100 years of the World Esperanto Association (UEA).*

• **Kontaktogrupo por lernantoj**
Emilio Cid el São Vicente, Brazilo, kreis novan retgrupon por antaŭenigi internaciajn kontaktojn inter lernantoj. Li diras: “Mi rimarkis, ke esperantistoj, kiuj ne havas eksterlandajn kontaktojn, malrapide progresas kaj emas forlasi la movadon.” La nova retgrupo nomiĝas “Tuta Mondo” ĉe www.ipernity.com/home/emilio. Li petas, ke oni traduku kaj adaptu lian inviton nacilingven kaj aldonu ĝin al naciaj retlistoj.

• **Bill Simcock (1918–2008)**
An obituary of Bill Simcock appeared in *The Guardian* on 11 February (www.guardian.co.uk/theguardian/2009/feb/11/obituary-bill-simcock). See also the previous issues of *EAB Update* and *La Brita Esperantisto*.

• **Por aldoni Esperanton en lingvolernan retejon**
<www.livemocha.com> estas usona senpaga lingvo-instruada retejo. Laŭ *New York Times* ĝi estas “potenca ŝanco por homoj el la tuta mondo interligi en la lingvo de la kontaktantoj”. Lecionoj estas ĝis nun haveblaj por nur kelkaj lingvoj. Estus bone, se aldoniĝu Esperanto, ĉar la retejo substrekas la socian aspekton de la lingvo, do ŝajne ne temas pri komercocela afero. Livemocha jam konsideras Esperanton, kiu aperas kiam oni rigardas la menuojn post ‘I

• **Furora informado pri Esperanto en Rusio longe efikos**
Ĉirkaŭ la 15-a de februaro, konata krimea esperantisto Paŭlo Moĵajev faris furoran prezenton de Esperanto en la due plej populara blogo de la ruslingva interreto – tiu de Artemij Lebedev, la fama aspektigisto kaj skandala VivĴurnala uzanto. Pri tio informas rusa *Esperanto-novosti* ĉe sia paĝaro www.e-novosti.info/blog/17.02.2009/2.

Artemij Lebedev anoncis novan formon de sciinterŝanĝoj, kiam fakulo anoncas sian profesiecon, kaj interesiĝantoj demandas lin pri io ajn koncerne la fakon. Moĵajev prezentis sin kiel profesia esperantisto (kio li fakte estas, enspezante, laŭ lia persona aserto, per Esperanto proksimume duonon de sia monata enspezo). La temo de Esperanto rezulte interesis publikon (pri biokemio, bank-aŭtomatoj kc.). Multaj demandintoj montris sin pensantaj homoj, sen preta antaŭjuĝo pri Esperanto. Dekoj ricevis trafajn respondojn de Paŭlo (al li kelkloke helpis moskvano Maksim Griŝin).

La tuta diskuto legeblas ĉe <<http://tema.livejournal.com/275854.html?thread=119180942#t119180942>>.

Informinto Vjaĉeslav (Slavik) Ivanov, el Peterburgo, aldonis: “Mi timas supertaksi la okazintaĵojn, sed ĝi vere estas la ĉefa ruslingva por-Esperanta evento de la monato februaro. Ĉar la diskuto restas konservita en la (dua/tria) plej populara blogo de la ruslingva interreto, ĝi ankoraŭ longe efikos.”

speak’ kaj ‘I am learning’, kaj ene de la retpaĝaro eblas voĉdoni por Esperanto ĉe <http://livemocha.uservoice.com/>.

• **EU Citizens’ Campaign on net**
At the end of January, 65 people had voted in the European Citizens’ Campaign for Esperanto to be a subject in British schools. If you have not voted, you can do at www.european-citizens-consultations.eu/uk/proposal/2061. Each EU nationality has its own ballot.

• **On language endangerment**
A conference on the Sociolinguistics of Language Endangerment, in conjunction with the 3L International Summer School in Language Documentation and Description at the School of Oriental and African Studies, in London from 22 June to 3 July will discuss a range of issues relating to language endangerment, and is open to all. For further information, see www.hrhelp.org/events/3L/index. Abstracts of talks will soon be on the CIPL website: www.ciplnet.com. Proposals for 20+5 minute presentations are now invited. Abstracts by 31 March 2009.

• **Simpozio pri plurlingvismo**
La asocio Eŭropa Observejo pri Plurlingvismo ĵus anoncis sian 2-an simpozion. Ĝi okazos de la 18-a ĝis la 19-an de junio 2009 en Berlino. (Vidu pli ĉe <http://plurilinguisme.europe-avenir.com/index.php>). La ĉi-jaraj temoj estos: • Kiel protekti la lingvan diversecon kaj samtempe eblegi interkomunikadon en Eŭropo, kaj eviti uzon de senkultura komunikilo? • Al vera plurlingva edukado de elementa lernejo ĝis universitato (La Observejo, diras ke la Komisiono proponis la formulon “1 + 2”, t.e. hejmlingvo + 2 fremdaj lingvoj, sed tio kondukis al: hejmlingvo + la angla + 1 fremda lingvo. • Lingvaj strategioj en la firmaoj. □



Esperantistoj ĉe la Monda Socia Forumo en Brazilo ankaŭ malstreĉiĝis (vidu paĝojn 1 kaj 2).

Rubrikestro: Saliko, Finnlando



SPORTO EN BRAZILO

Brazilanoj praktikas plurajn specojn de sporto, ĉefe futbalon, la plej konatan el ĉiuj en la tuta mondo.

Kvin-foje Brazilo gajnis la mond-pokalon: 1958, 1962, 1970, 1994 kaj 2002.

Ĝi estis vic-ĉampiono dufoje: 1950 kaj 1998. Ankaŭ gajnis sep amerikajn pokalojn.

Kiu ankoraŭ ne aŭdis paroli pri la famaj brazilaj futbalistoj Pelé, Ronaldo, Ronaldinho, Zico?

Krom futbalo, preferataj sportoj en Brazilo estas ret-pilko, plaĝo-retpilko, korbo-pilko, vet-kurado kaj teniso. Aliflanke, estas tie ĉi alia sporto (mikso de danco kaj lukto) kiun la afrikaj sklavoĵoj kunportis en la 17a jarcento, kies nomo estas Kapoejro.

En 1972, Nacia Sport-Konsilio establis kapoejron kiel sportospecon, donante al ĝi specialajn regulojn por konkuroj. Pere de Brazila Boks-Konfederacio, ĝia praktikado, kiel sporto, estis oficiale reguligita. Oni trovas kapoejristojn ĉefe en Ŝtato Bahio, nord-orienta regiono de Brazilo.

Spektu du filmetojn pri Kapoejro pere de subaj retadresoj:

<http://www.youtube.com/watch?v=RE9KnoD6y2A&feature=related>

http://youtube.com/watch?v=_g-jt4jewA

La tekston verkis *Liette Lêla*, Brazilo.

Reviziis ĝin *Célio Freitas Martins*.

Por trovi aliajn raportoĵojn, vizitu nian hejmpaĝon sub "ĉenraportoĵoj" : www.junaamiko.inf.hu . Se via lando ne raportas, fariĝu vi raportanto.

Klarigoj: plaĝo (*strando*): apudlaga loko por feriantoj. pokalo: trinko-vazo, ofte funelforma kun larĝa faŭko (buŝo), ofte el valora metalo, donacita kiel trofeo al la venkinto en sporta konkurso. sklavo: senrajta homo, apartenanta kiel objekto al alia homo, kiu lin aĉetis aŭ kaptis en milito.

Juna Amiko proponas buntan kaj tutmondan enhavon. Por la aktuala numero Azio forte kontribuis: fableca legendo el la montega lando Nepalo, anekdotoj el la granda Bharato (Hindio), aventura rakonto pri pli granda Ĉinio (verkita de ĉeĥo kaj sendita de germano) kaj legendo el Vjetnamio. Aldoniĝas tradukoj el Kubo – legendo kaj teatraĵeto. Aperos plie kvizo, la bildstrio pri la aventuroj de la vojaĝantaj instruistoj Emilo kaj Erni, artikolo 'Ĉu vi scias, ke ...' kaj la kutima rubriko pri lernejaĵoj kaj movadaĵoj. Humuro figuras en formo de pluraj ŝercoj, kaj en amuzaj poemo kaj skeĉo pri la frezeniga flanko de retbabilado.

• If you would like to subscribe to *Juna Amiko*, send just £11 to the EAB office (Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE) with your name and address, or order on-line at www.esperanto-gb.org

Multaj novaj aferoj el la junularo

www.jeb.org.uk

Tuj post Kristnasko, ses JEBanoj vojaĝis al la bela germana urbeto Biedenkopf por partopreni en la Internacia Seminario. Por Chris, Guy kaj Clare tiu estis la unua IS, kaj ili ege ĝuis la eblon festi kaj ekkoni interesajn homojn en internacia etoso. Por Rolf, Tim kaj Gavan, tamen, estis labora semajno, ĉar ili ĉiuj membras en la organiza teamo. Pro tio ke li estas la ĉef-organizanto, Rolf certe havis plej multe por fari kaj deĵoris ĉiutage. Dum la tagoj li gvidis sesiojn kaj prelegojn, ekzemple pri la amuza temo 'Kiel savi Esperanton de la esperantistoj'. Dum la vesperoj li enkondukis la distran programon, kaj ofte mem havis gravan rolon en ĝi. La plej populara programero de la semajno verŝajne estis 'Kiu volas iĝi milionulo', en kiu Rolf rolis kiel Chris Tarrant. Ankaŭ Gavan faris grandan kontribuon al tiu bonega vespero. La lumoj, pri kiuj li respondecis dum la tuta semajno, estis perfekte kunordigitaj kun la bildoj kaj muziko, kaj tiu ege profesiigis la ludon.

Kurso por veraj komencantoj
Ankaŭ Tim Owen estis tre okupita. Matene li instruis la kurson por komencantoj, kaj ĉi-jare li havis verajn komencantojn, kelkaj el kiuj antaŭe eĉ ne konis la alfabeton. Ĉiuj bone progresis, tamen, kaj je la fino de la semajno kapablis babili kun pli spertaj esperantistoj sufiĉe bone. Tim faris ankaŭ tre interesan prelegon, kiu temis pri laborantaj infanoj. Multaj homoj ĉeestis, kaj entuziasme pri-diskutis ĉu povas esti situacioj, en kiuj estas bona afero se infanoj laboras. Ni ne ĉiuj interkonsentis!

Tutnova 'Junulara Esperanto-Semajno'

Silvestron vespere venis granda anonco de la IS-teamo. Per filmo oni klarigis al ni, ke venontjare la IS ne okazos. Sed ne timu, ke ne plu estos vintra aranĝo por gejunuloj! La tradicia germana evento kuniĝos kun la pola Ago-Semajno, kiu lastatempe okazas dum la sama postkristnaska semajno. La novaĵo, ke oni ne plu devos elekti inter la du renkontiĝojn ege plaĉis al la IS-partoprenantoj, kaj ni jam antaŭguas la venontan vintron, kiam ni vojaĝos al Zakopane en Pollando por ĉeesti la unuan Junularan Esperanto-Semajnon (JES). Kune kun aliaj germanaj kaj polaj organizantoj, Rolf denove havos gravan rolon, kaj ankaŭ Tim kontribuos. Li jam kreis belan neĝhoman simbolon por JES, kiun vi povas vidi, kune kun pli da detaloj ĉe la retpaĝaro http://eo.wikipedia.org/wiki/Junulara_E-Semajno.

Denove tre ĝuinda sperto

Kompreneble JEBanoj daŭre okupiĝas pri Esperanto en Britio. En Januaro Mikeo, Tim kaj Clare ĉeestis la 'Ni Festivalu'-semajnfino en Barlastono, kie okazis kunveno de la JEB-komitato.

Ni diskutis multajn aferojn, ekzemple la kontribuon de JEB al la venonta Brita Kongreso, kaj la statuton de la asocio. Ni ĉiuj ĝojis pro la eblo renkonti kun Geoffrey Greatex, kiu rakontis al ni kelkajn interesajn aferojn pri la pasinteco de JEB. Nia kunveno feliĉe ne daŭris la tutan semajnfinojn, kaj ni do povis ĉeesti la diskutrondon, kiun organizis Derek Tatton. Por Tim kaj Clare tiu jam estas la tria diskutrondo, kiun ili partoprenis, kaj denove tre ĝuinda sperto.

JEB renkontiĝo kun la nova klubo en Notingamo

Intertempe Guy Johnston daŭre aktivas en Notingamo. La loka grupo, kiun li starigis pasintjare, renkontiĝis je la fino de januaro, kaj la membroj pasigis agrablan vesperon kune en trinkejo. Pro la sukceso de liaj klopodoj, JEB decidis okazigi sian venontan renkontiĝon en Notingamo, kaj invitis ĉiujn membrojn de la Notingama klubo ĉeesti.

La sekva JEB-renkontiĝo estos dum la Brita Kongreso en Salisbury, kie okazos nia jarkunsido. Ĉi-jare ni estas feliĉaj, ĉar alparolos nin la juna pola esperantisto Przemek Wierzbowski pri siaj spertoj de Esperantujo. Ni esperas, ke multaj gejunuloj ĉeestos – pli da informoj troveblas ĉe nia retpaĝaro <http://www.jeb.org.uk>.

Clare Hunter

Kunodiĝo anoncita!

Clare Hunter kaj Tim Owen en februaro anoncis sian gefianc-



iĝon. Elkorajn gratulojn al ili! Jen la feliĉa paro:



Popular JEB Secretary Clare to address North West Federation

JEB secretary, Clare Hunter, will be the guest speaker at the North West Esperanto Federation's spring 2009 meeting in Preston. Her presentation entitled "Mi kaj Esperanto: Spertoj kaj Esperoj" will follow the AGM under the leadership of Federation chair-

man, Stephen Thompson.

This convivial event includes a Lancashire Hot Pot buffet lunch, sandwich tea break and free tea and coffee, as well as Esperanto conversation circles and the ever-popular raffle. The Empire Services Club in Hartington Road, Preston, is the comfortable venue for the meeting and is conveniently located five minutes away on foot from the main rail station.

Esperanto-speakers are invited to attend this annual event, which will take place on Satur-

day, 9 May 2009 from 12 noon to 5 pm. To book, please send a cheque for £10 made payable to: South Lancashire Esperanto Group to: Andrew Wheatley, PO Box 103, Lytham St Annes FY8 3GU (tel. 07543 301467 – mobile). Ensure that the cheque arrives before Wednesday, 29 April, and please tell Andrew if you are a vegetarian.

Jim Voiels,
NW Esperanto Federation
Assistant Secretary

Orienta Federacio saltis en vivon

La Orienta Federacio saltis en vivon dum sia somera pikniko. Kutime tiu kunveno allogas nur kvar-kvin personojn, sed en aŭgusto alvenis dek kvin, plus tri familianoj, ĉe Boydells Dairy Farm en Essex, la bieno de la nuntempa O.F.-prezidanto, Roy Threadgold. Ni ĝojas, ke sukcesis ĉeesti tiom da anoj; aparte menciinda estas Ben Gosling, kiu biciklis ĉirkaŭ 30 mejlojn.

Dum ni esperantistoj, fratino kaj du nevetoj de iu ano rigardis diversajn bestojn kaj eĉ ŝafmelkadon – ege nekutiman vidajon.

Dume la plimulto preparis sin por promeni. Provizita per Esperanta listo de eble vidotaj plantoj, arboj, bestoj kaj birdoj, ili ekmarŝis laŭvojete tra la bela kamparo. Konstanta babilado kaj ridado aŭdiĝis dum la promeno, tamen kelkaj sukcesis vidi cervon. Post eble horo, preskaŭ la tuta grupo reeniris la piknikojon, kie ni refreŝiĝis per teo. Sed mankis kvar-kvin. Post plia duonhoro ili finfine alvenis; ili tute perdiĝis kaj estis devigataj peti direkton ĉe iu farmdomo. Kien ili forvadis nur Dio scias!

Post la aftfebra krizo de 2001, Boydells Dairy Farm ricevis de la



esperantistaro transrojan ponton memore al la bestoj, kiuj pereis kiel rezulto (pro la febro, ne la ponto). Do, foto nepris.

Dum la fina parto de la tago

okazis montrado de kolekto de serpentoj, lacertoj, tarantuloj, skorpioj ks., kiun alportis juna farmlaboristo.

Roy Threadgold

Informa kunveno okaze de Kristnasko en suda Londono

La 13-an de decembro 2008 la Sud-Londona Esperanto-Grupo (parto de la Sud-Orienta Esperanto-Federacio) organizis Kristnaskan Feston kaj Naskiĝ-feston de d-ro Zamenhof, ĉe Unity Centre of South London en Balham. Ĉeestis dudek unu personoj, kaj ni ĉiuj pasigis tre ĝuindan tempon. Al la okazaĵo ni invitis kaj esperantistojn kaj neesperantistojn, por ke ni povu informi pri la lingvo al aliaj – do ĉiuj estis bonvenaj.

Kiel kutime, estis multe da manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, sed ankaŭ pluraj distraĵoj kaj 'specialaĵoj'. Annice Szrajbman preparis interesan montraĵon pri Esperanto, kun multaj bildoj kaj informoj pri la uzo de la lingvo. Greta Buttinger kunportis unu el siaj gastlibroj por montri al aliaj. Gastparolanto, David Lally, la prezidanto de la Eŭropa Scienfika Asocio, invitita de Peter Redfarn, interese parolis pri la Asocio kaj siaj vojaĝoj al diversaj

landoj por ĉeesti kongresojn kaj kunvenojn. D-ino Pat Kudiabor parolis pri la diversaj servoj de Unity Centre, kaj d-ro Ambrose Togobo pri la nova dieta kaj bonstatiga programo, kiun la centro senpage ofertas al ĉiuj. Peace Kudiabor parolis pri la movado 'Unity' kaj donis ekzempleron de la libreto *Daily Word* al ĉiu. Ni donis informojn kaj la adreson de la Esperanto-movado en Ganao, kaj ili

promesis, ke kiam ili vizitos la landon, ili kontaktos la movadon kaj transdonos salutojn el Sud-Londono! Poste Kevin Bourne kaj Gregory Porilo muzikis, kaj ĉiuj kunkantis kelkajn kristnaskajn kantojn. Ĉi-jare la festo okazos la 12-an de decembro, do bonvolu enskribi ĝin en vian agendon. Venu kaj alportu viajn amikojn!
Gregory Porilo

Kathleen Hand's 100th birthday party

Kathleen was born in Stockport, Cheshire, on 2 February 1909. The family moved later to Liverpool, where Kathleen commenced her career with the Civil Service, first with the Ordnance Survey, later moving to the Probate Department. She learned Esperanto in her teens with the Liverpool Esperanto Society, and enjoyed many events throughout Britain and abroad. Particularly enjoying visits to her cousins in Florida. She also taught Esperanto to many of her friends, but in her teens, during an operation, a facial nerve was accidentally cut, which caused problems, particularly affecting her speech. She never let this affect her love of Esperanto and travelling, however, regularly attending meetings of the Esperanto-Rondo in Liverpool, the North-West region and Wales, until comparatively

recently, when her health began to fail. On her 100th Birthday, Monday, 2 February, goddaughter Angela and family, together with the staff, arranged a wonderful party with music, singing and dancing for the residents and Kathleen to celebrate her centenary in style.

Vivienne Isherwood and Ian Mac Dowall of the Liverpool Esperanto-Rondo and the South-Lancashire Esperanto Society attended the party.

Kathleen was surrounded by birthday cards, including one from the Queen, of course, one from the Civil Service, and many from Esperantists not only from the North-West region but also from EAB and all over Britain. These were on a separate table by Kathleen so she could study them all without having to move. On behalf of the North

West Esperanto Federation, Vivienne and Ian gave Kathleen a



Left to right: Annette Timewell (deceased), Doreen Winterburn and Kathleen Hand (100 years old)

New Members of EAB

Mrs. C. Berry, Skipton
R.S. Butler, Surrey
Richard Carter, London
Stanley J. Drake, USA
J.A. Duckworth, Altrincham
C. Duncan, Essex
Frances Eason, Suffolk
Heather Eason, Cardiff
James Gibbins, Spain
Revd H.R. Hall, Wrexham
G.D. Johnston, Prestwood
D.E. Kennard, Somerset
Robert Taylor, York
Eric Tidy, Harlow, Essex

New Supporters

Roger W. Moore, Chester

Deceased Members

Eva Goulding, Preston
Robert Russell, Glasgow
Ivy Shelton, Andover

Completed the Free Postal Course

Dimitri Denisjonok, Hull

Completed the Elementary...! Course

Eleanor Gibb, Germany

beautiful bouquet of flowers for her bedroom, together with sweets and chocolates, for her to give to her carers at St Martin's Care Home, Oakhill Park, who had worked so hard to make it such a successful event. Some of Kathleen's friends from a Rambling group she used to run, were also able to attend. She had taught them Esperanto too, many years ago, and they were still able to say a few words in it.

Although conversation with Kath is not easy, her eyes clearly showed that she could still read who the cards had come from and that she was enjoying the party and seeing her old friends again.

All in all a successful 100th birthday for our longest-serving member of the North West Esperanto Federation and perhaps of the British Esperanto Association.

Ian Mac Dowall

- Make sure media reference sections and your town, county, university or school library have a copy of this unique work of international reference in English



Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto

- preface by Dr. Humphrey Tonkin, Professor of the Humanities and President Emeritus at the University of Hartford, Connecticut
- general introduction to Esperanto literature, its history, evolution and modern development
- individual introductions to the five periods of the literature
- over 300 individual articles on the most important writers and their work in chronological order, with biographies and critique
- sample literary texts from some of the best original authors
- an introduction to the language itself, its linguistic structure and creative capabilities, including *Esperanto from the Viewpoint of a Writer* by Claude Piron
- extensive bibliographies and index

Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto 1887-2007 by Geoffrey Sutton. New York, NY: Mondial, 2008. x + 728 pages. Format: 6" x 9" (152 x 229 mm). ISBN 978-1-59569-090-6. Price €66.00 + p.&p.

• Place your order online at <www.librejo.com/enciklopedio>, by fax (+1-208-361-2863), or by e-mail: informo@librejo.com. Mondial will respond promptly with information on the various means and prices of carriage. Mondial (Ulrich Becker), 203 West 107th Street, Apt. 6 C, New York, NY 10025, USA.

Resale outlets should contact Mondial (informo@librejo.com) to agree a price. Pay only after agreement on the cost of carriage. Payment may be made by US bank cheque in US\$; or by giro to a bank in Germany; or to Mondial's account at UEA, Netherlands. Also available from EAB at £48.80 + £7.50 p. & p..



Utila Estas Aliĝo estas bele produktita libro, verkita en klara kaj flua lingvaĵo, kun riĉa kvanto da fotoj el la historio de Universala Esperanto-Asocio, kiu pasintjare festis sian 100-jariĝon.

Post la apero de la unua libro de Zamenhof en 1887, sendube la plej grava dato en la historio de Esperanto estas la fondo de UEA dudek unu jarojn poste, en 1908. Okaze de sia 100-jara jubileo, UEA aperigis ĉi tiun eldonaĵon. Ĝi ne estas plena analizo de la historio de UEA, sed la tri kontribuoj celas lumigi la historion kaj stimuli al pliaj esploroj.

La unua kontribuoj elstarigas la ĉefajn trajtojn de la agado de UEA dum cent jaroj. La aliaj du koncentriĝas al personoj, kiuj komence kaj dum granda parto de la ekzistado de UEA profunde influis la asocian farton: Hector Hodler kaj Ivo Lapenna.

D-ro Ulrich Lins estas historiisto, kiu estas jam bone konata pro sia gravega libro *La danĝera lingvo* (1988) pri persekutoj kontraŭ Esperanto.

- *Utila Estas Aliĝo* de Ulrich Lins. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio, 2008. 126 paĝoj. 16 x 23,5 cm. Ilustrita. ISBN 978-92-9017-105-8.

SPECIALA PREZO sole ĉe EAB, **NUR £12**, inkluzive de afranko kaj pakkostoj (prezo plus sendokostoj ĉe UEA £15,20).